
1883 1983



# 100 jaroj de ĉeĥa nacia teatro en Prago

1983 · 4 · 97

Starto






## LA MONDA ASEMBLEO EN PRAGO KAJ ESPERANTO ✱

Pri la Monda Asembleo por Paco kaj Vivo, kontraŭ la Nuklea Milito estis jam multe skribita. Oni scias, ke partoprenis dum 21.6. - 26.6.1983 3.625 partoprenantoj el 132 landoj, ke pli ol 25% estis virinoj kaj 80% de tiuj partoprenantoj venis el nesocialismaj landoj. Ni povus paroli pri centmiloj da salutleteroj kaj mesaĝoj el tuta mondo, ke preskaŭ 2.000 homoj diskutis pri la supremenciita problemo.

Sed vi certe ne multe scias, ke ankaŭ dum la Asembleo partoprenis kaj ankaŭ organize laboris geesperantistoj. Jes, nia asocio estis petata aranĝi dum la Asembleo kunvenon "ĉirkaŭ la ronda tablo" je la temo Komunikado inter la homoj. Garanto por tiu kunveno estis sekretario de asocio Z. Křimský. Enkondukajn vortojn preparis kaj prelegis D-ro J. Jermář, CSc, prezidanto de ĈEA kaj organize helpis dum la kongreso inĝ. V.Kočvara, vicprezidanto de asocio kaj inĝ. M. Turková, redaktorino de PACO.

Kunvenis por debato homoj el 11 landoj - de Aŭstralio ĝis Danlando. La debato estis vigla, ĉar komunikado ne estis nur lingvo aŭ nur Esperanto, sed ankaŭ la kulturo, emocioj, tekniko, ktp.

La hinda partoprenanto, filma reĝisoro, parolis pri la ebleco esprimi la mesaĝojn ankaŭ senvorte - pere de filmo. Verkistino el Danlando rakontis, kiel Danoj estas intence pere de

propagando misinformataj, ke iliaj ĝekolegoj, kiuj venis al Prago, miris, ke ili ne vidis malriĉulojn - simple ni ankaŭ ĉiuj havas du piedojn, du manojn kaj unu kapon, kiel ŝi mem trafe diris.

Post preskaŭ kvinhora debato, en kiu kompreneble estis ankaŭ informoj pri Esperanto kaj ĝiaj eblecoj, estis unuanime akceptita rezolucio, kiun vi legos aliloke. La rezolucio estos sendata al diversaj institucioj kaj samtempe ĝi aperos en kompletaj materialoj de la Asembleo. Sed ankaŭ vi povas ĝin uzi kaj dissendi en la mondon.

Bedaŭrinde, ĝis nun UEA ne trovis la vojon al tiu tutmonda porpaca movado. Ĉu aŭ iu el estraro de UEA pensas, ke politiko por paco estas ne neŭtrala? Ĉu povus iu vere tiel pensi? Se ne estus paco, ĉu poste estus Esperanto - aŭ ĉu iu pensas, ke la atombomboj ne trafus geesperantistojn?

Mi devas bedaŭrinde diri, ke UEA ne trovis intereson aliĝi, kaj tion mi eĉ ne volas diri, ke la reprezentanto de UEA estis rekte invitita partopreni. Ni ofte citas la filozofion aŭ, se vi volas, ideologion de D-ro Zamenhof. Ĉu li ne batalis por paco?

Fine de la Asembleo invitis prezidento de nia republiko D-ro G. Husák ĉiujn geesperantistojn je la bankedo.

Sur la fotoj vi povas vidi kelkajn esperantistojn en la granda salono dum la Asembleo kaj dum la kunvenoj en diversaj lokoj de la moderna Palaco de Kulturo en Prago.

-kýz-






PRAGA PACREZOLUCIO **


Ni, partoprenantoj de malgranda renkontiĝo KOMUNIKADO INTER LA HOMOJ, kunvenis dum la Monda Asembleo por la Paco kaj Vivo, kontraŭ la Nuklea Milito en Prago por interŝanĝi opiniojn pri komunikado kaj ĝia tasko en interhomaj rilatoj.


Niaj lingvoj estas diversaj, sed la celo estas la sama: daŭra vivo en la paco, forigo de danĝero de militoj, malebligo de plua nuklea armado. Grandan signifon de komunikado en ĉiuj sferoj de homa agado ni konsideras je baza rimedo de interŝanĝo de opinioj, ideoj kaj kulturaj valoroj. Ni turnas nin al ĉiuj, kiuj okupiĝas pri komunikado profesie aŭ ŝatokupe, al unuopuloj, al naciaj kaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj, ke ili uzu rimedojn de komunikado por fortigi la mondan pacon.

Ni kredas, ke same kiel ni ankaŭ vi parolos kaj informos pri praga Asembleo dum personaj agadoj, sed ankaŭ en amasaj komunikiloj, disvastigos objektive ĝiajn konkludojn, ideojn de paco kaj interkompreniĝo.

Aprobita far partoprenantoj
de renkontiĝo el 11 landoj.

## REZOLUCIOJ AKCEPTITAJ DUM LA 68a UK EN BUDAPESTO





de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983 kun 5010 reprezentantoj el 50 landoj....

1a teksto

.... traktinte la sociajn kaj lingvaj aspektojn de la moderna komunikado

.... konstatas, ke kvankam la komunika teknologio prezentas eblecojn solvi mondajn komunikajn problemojn kaj plialtigi la vivnivelon de parto de homaro, ĝi riskas - se ne juste kaj demokrate uzata - pligrandigi la fendon inter tiuj kiuj havas kaj tiuj kiuj ne havas la rimedojn de komunikado. Tiu risko estas aparte aktuala kiam temas prievolulandoj rilate al industrilandoj, sed ĝi ankaŭ ekzistas intere de unuopaj landoj,

.... atentigas pri tio, ke la teknologia kaj lingva flankoj de komunikadone estas disigeblaj,

.... rekomendas al organizaĵoj interesitaj en komunikado doni pli daatento al la lingvaj dimensioj de la internacia komunikado kaj al la rolo kiun Esperanto - per siaj facileco kaj neutraleco - povus ludi en tiu kunteksto,

alvokas al organizaĵoj okupiĝantaj pri lingva edukado kaj aliajlingvaj demandoj domi pli da konsideroj al la rezultoj de la evoluo de la komunika teknologio kaj al ties implicoj rilate la nunan lingvan ordon en la mondo cele al ĝia plijustigo kaj plidemokratigo.



2a teksto

.... traktinte la sociajn kaj lingvajn aspektojn de la moderna komunikado

.... konsciente pri la rapida evoluo sur la kampo de komunika teknologio, kaj pri la graveco rilatigi Esperanton al la modernaj komunikiloj,

.... konstatinte ke la sukcesigo de Esperanto grandperte dependos de la kapablo de Esperanto-parolantoj resti kun la moderna komunika teknologio en kontakto kaj montri al la mondo kiel ĝi povos esti utiligata por krei pli justan kaj demokratan ordon en kiu Esperanto ludos esencan rolon,

.... alvokas al la Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj al ĉiuj sciencaj instancoj okupiĝantaj pri la internacia lingvo doni pli da atento pri komunika teknologio, studi tiun ĉi problemaron, eduki siajn membrojn pri ĝi kaj informi la koncernajn neesperantistajn mediojn pri la perspektivoj de la aplikado de Esperanto en tiu ĉi kampo.

3a teksto

.... studinte la planojn starigitaj de diversaj Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj traktinte la ĝisnunajn agadojn rilate al la Centjara Jubileo de Esperanto,

.... konsiderante de la Centjara Jubileo prezentos en la venontaj jaroj nepreterlaseblajn eblecojn por atentigi pri Esperanto,

.... alvokas al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj tra la mondo doni prioritaton al laboroj tiurilataj.

La 68a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis 3.07-06.08.1983 en Budapesto, estis plejnombra en esperanta historio. Partoprenis pli ol 5.000 personoj. Inter tiuj estis ĉirkaŭ 300 da geesperantistoj el ČSSR.

Dum la Kongreso traktis Komitato de UEA kaj elektis kaj novan prezidanton kaj novan estraron de UEA. Okazis kelkaj personaj sanĝoj en la estraro sed ankaŭ la estraro plinombriĝis kaj akceptis reprezentantoj el Azio. Vidu liston sube. Interesaj estas por vi eble ankaŭ la faktoj, ke aliĝis al UEA nova landa asocio - el KUBO - kaj anoncis aliĝon dum estonta kongreso en Kanad Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. Prezidanto de UEA estis invitita en Moskvo por trakti bezonajn aferojn.

Listo de la estraro de UEA kun iliaj oficteskoj :

| | | |
|---|---|---|
| prezidanto : | G. Maertens | - finacoj kaj administrado |
| vicprezidanto: | Umeda | - informado |
| vicprezidanto: | Tonkin | - esploro kaj rilatoj al UN |
| ĉefsekretario: | Felsö-Szabo | |
| membro : | Ragnarsson | - edukado, kulturo |
| membro : | Corssetti | - landa agado, planado Jubilea Jaro, delegita reto |

| | | |
|---|---|---|
| membro | : Todorov | - faka agado, aplikado de Esperanto |
| membro | : Despiney | - junularo, eksteraj rilatoj |
| membro | : Lindblom | - kongresoj |

La 68a UK akceptis 3 rezoluciojn. Iliajn tekstojn vi povas legi aliloke.

## Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA

SEMINARIO PRI APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO A E S T ʼ 8 4

Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA anoncas al siaj membroj kaj al eksterlandaj gekolegoj, ke la tradiciaj seminarioj pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko - aranĝataj en Ĉeĥoslovakio ekde 1978 - estas daŭrigotaj per AEST ʼ84, de la 31-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro 1984 en la moravia metropolo B R N O . La ĉefa temo de la seminario estas PERSPEKTIVOJ DE LA MONDA NUTRAĴ-PRODUKTADO. La temo rilatas al unu el la plej aktualaj problemoj de la homaro kaj tuŝas ne nur la tradiciajn nutraĵproduktajn fakojn, kiel ekzemple agrokulturon, bestbredadon k.a., sed ankaŭ aliajn sciencajn kaj teĥnikajn fakojn, ekzemple ĥemion /sterkado, ĥemia planprotektado, sinteza manĝaĵo, ktp./, maŝinkonstruadon, medicinon, veterinaran medicinon, nutraĵkonservadon, vivomedion, geologion, meteorologion kaj aliajn.

La dua sekcio de la seminario AEST ʼ84 estos dediĉita al problemoj de la faka Esperanta terminologio kaj tradukado.

La prelegoj kaj fakkunvenoj okazos en Sindikata Domo Kultur- kaj Sciencfaka /Klub školství a vědy/ en la moderna parto de la urbocentro. La loĝado estas certigita en moderna altlerneja studenta hejmo proksime de la seminariejo, kie estas eble ankaŭ matenmanĝi.

Se vi intencas partopreni skribu tuj al: Inĝ. Zdeněk PLUHAŘ, CS-507 51 HOLOVOUSY V PODKRKONOŠÍ 109, Ĉeĥoslovakio. Aŭtoroj de prelegoj ricevos detalajn instrukciojn, kiel pretigi la manuskripton kaj desegnaĵojn. La prelegmanuskriptoj preparitaj laŭ la instrukcioj kaj venintaj antaŭ la 15-a de februaro 1984 estos enpresitaj en speciala kolekto de referaĵoj, kiun ricevos ĉiu partoprenonto antaŭ la seminario. Ĉiujn aliajn informojn, t.e. liston de prelegoj, informojn pri la programo, prezoj, ktp. ricevos la aliĝintoj ĝustatempe.

Kurantajn informojn pri la seminario AEST ʼ84 vi trovos en STARTO, BUDAPEŜTA INFORMILO kaj BULTENO de EK BRNO.

Ni ĝojas renkonti vin en Brno.

En la nomo de la organiza komitato de AEST ʼ84:

Doc. d-ro V. NOVOBILSKÝ, CSc,
prezidanto de STS-ĈEA.



SCIENC-TEĤNIKA SEKCIO DE ĈEA INFORMAS

LERNOLIBRO DE ESPERANTO PRO KOMPUTISTOJ KAJ ELEKTRONIKISTOJ estas verkata far inĝ. P. CHRDLE /Lidická 941, CS-252 28 Černošice, ČSSR/ kaj R. HOWARD. La lernolibro estas skribata nur Esperantlingve kun nacilingvaj aldonoj en la ĉeĥa, angla, rusa, germana kaj franca lingvoj. La aŭtoroj kredas, ke la libro servos kiel lernolibro de Esperanto por komputistoj kaj kiel lernolibro de bazaj scioj pri komputado por la ceteraj esperantistoj.

MEMBROJ DE STS-ĈEA ELUZU RIĈAĴON DE NIA FAKA BIBLIOTEKO. Petu liston de la fakaj publikaĵoj ĉe la sekretario J. LAUBE, Alej Rudé armády 811, 413 01 ROUDNICE. Prizorgantoj de la biblioteko estas al vi dankaj, se vi povus disponigi por la interesatoj fakajn publikaĵojn, kiujn vi povus malhavi. Anticipan dankon!

NOVAN ALIĜILON AL STS-ĈEA - ĉu vi jam resendis? Nur multnombra scienc-teĥnika sekcio imponos al la neesperantista publiko. Tial: remembriĝu al la sekcio kaj membriĝu viajn gekolegojn. La aliĝilojn petu ĉe la sekretario.

SCIENC-TEĤNIKA SEKCIO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO plenas fondi en 1984 INTERNACIAN SOCIETON DE TEKNOLOGIISTOJ PRI SUKERKANO. Ĉeĥoslovakaj suker-specialistoj estas petataj kontakti la STS de Kubo kaj liveri E-lingvajn artikolojn, revuojn aŭ librojn pri ĉiuj temoj rilatantaj suker-produktadon /Roberto Torres ALVAREZ, Scienc-teĥnika sekcio, poŝtkesto 2018, Hvano 2, HAVANO, Kubo/.

LA BELASPEKTA BULGARA URBO KARLOVO fariĝis renkontiĝ-loko por esperantistoj-fakuloj de branĉoj EKOLOGIO, patentteĥnika informado kaj interlingvistiko. Tiujn ĉi temojn pritraktis ĉ. 30 partoprenintoj el Anglio, Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando, Sovet-Unio kaj Vietnamio dum la internacia seminario ESPERANTO KAJ SCIENC-TEĤNIKA PROGRESO, kiun organizis Scienc-teĥnika sekcio de BEA la 2. - 5.6.1983, kunlabore kun Domo de teĥniko en KARLOVO. El Ĉeĥoslovakio partoprenis aktive inĝ. Petr CHRDLE kun prelego pri instruado de Esperanto por fakuloj kaj ĝiaj specifaj problemoj, en kiu li prezentis internacian lernolibron de Esperanto por komputistoj.

MOSKVA SCIENCISTA ESPERANTO-KLUBO /fondita en decembro 1981/ havis fine 1982 entute 27 membrojn. Inter ili troviĝas 2 doktoroj de scienco kaj 10 doktoriĝaj kandidatoj. La klubo okazigis ĝis nun 11 sciencajn prelegojn el la tereno de atomfiziko, ekologio, interlingvistiko, matematiko, geografio kaj futurologio.

AKADEMIO DE ESPERANTO havas kvin novajn membrojn: Probal DAŜGUPTO /vicprofesoro pri sanskritidaj lingvoj en PUNEO, Hinda Unio/, Bernard GOLDEN /arkeologo en VESZPRÉM, Hungario/, Li SHIJUN /tradukisto en PEKINO, Ĉinio/, Bruce Arne SHERWOOD/vicdirektoro de esplorlaboratorio pri komputila instruado en URBANA, Usono/ kaj Humphrey TONKIN /profesoro pri la angla literaturo en FILADELFIO, Usono/.

INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO, Veliko Tarnovo - Sviŝtov, Bulgario, la 18. - 24.7.1983. La popularsciencaj prelegoj pri literaturo, muziko, teatro, astronomio, fiziko, ĥemio, interlingvistiko k.a., okazis en la universitato KIRILI I METODI, Veliko Tarnovo kaj en la Supera ekonomia instituto en SVIŜTOV.

S-ANO JURIJ V. ORLOV EL ĤERSON /Ukraina SSR/, kiu laboras kiel prezidanto de la regiona konsilio de la societo de inventistoj kaj raciigantoj turnis sin al la STS-ĈEA. Li proponas kunlaboron en sfero de disvolvado de la movado por INVENTOJ, RACIIGOJ aŭ novaj metodoj en la PRODUKTADO. Ni volus rekomendi al ĉiuj, kiuj laboras aŭ praktike interesiĝas pri enkondukado de novaj metodoj aŭ kiu havas praktikajn problemojn, skribu al Jurij Viktoroviĉ ORLOV, str. Strelkovoj divizii n-ro 295, 325 000 ĤERSON, Sovet-Unio.

## JUBILEA KONKURSO POR LA REDAKTOROJ DE LA ESPERANTO-REVUOJ *

Okaze de la proksimiĝanta 25-jariĝo /4.4.1984/ de la Esperanto-Redakcio de RADIO POLONIA, la redakcio organizas apartan konkurson por la redaktoroj kaj kunlaborantoj de la E-revuoj, E-informiloj kaj klubaj bultenoj. Ĝi tekstas KONKURSO PRI ARTIKOLO AŬ RECENZO pri la ĝenerala agado de la Esperanto-Redakcio de Radio Polonia aŭ pri konkreta ciklo de la dissendoj aŭ pri iu laŭplaĉe elektita elsendaĵo.

La konkursa ĵurio, kiun eniros ankaŭ E-ĵurnalistoj laborantaj ekster la Pola Radio, prenos en konsideron la konkursaĵojn, kiuj aperos en E-revuoj, informiloj aŭ klubaj bultenoj antaŭ la 31-a de decembro 1983. La konkursaĵojn oni sendu al la adreso: RADIO POLONIA, Esperanto-Redakcio, 00-950 VARSOVIO, poŝtkesto 46, POLLANDO, kun la kromnoto: KONKURSO PRI ARTIKOLO AŬ RECENZO - en la formo de almenaŭ unu ekzemplero de la koncerna revuo, informilo aŭ bulteno.

En la konkurso oni akceptos ankaŭ artikolojn pri la E-elsendoj de RADIO POLONIA, aperigitajn en naciligvaj, ekstermovadaj revuoj kaj gazetoj, sub la kondiĉo, ke ankaŭ estos sendita al ni unu ekzemplero de la koncerna revuo aŭ gazeto, kaj atingos nin ankaŭ ĝis la 31-a de decembro 1983. En ambaŭ kazoj decidas la dato de la poŝta stampo.

La rezultoj de tiu ĉi speciala konkurso estos anoncitaj en ĉiuj E-elsendoj de RADIO POLONIA la 29-an de februaro 1984. Al la aŭtoroj de la plej interesaj konkursaĵoj oni atribuos valorajn objektajn premiojn kaj inter ĉiuj oni lotumos krome sonkasetojn kun originala fragmento de parolado de Ludoviko ZAMENHOF, fragmento, kiu feliĉe konserviĝis.

Ni tutkore invitas niajn gekolegojn - ĵurnalistojn partopreni la KONKURSON PRI ARTIKOLO AŬ RECENZO.

Ni atendas viajn publikaĵojn.

RADIO POLONIA,
Esperanto-Redakcio

## EKSTERLANDAJ KOMUNUMOJ NOMATAJ L I D I C E *

Atentindan laboron pri diverslandaj komunumoj, kiuj portas la nomon de la konata ĉeĥa vilaĝo LIDICE, neniigita far faŝistoj dum la dua mondmilito, kompilis la juna esperantistino el



Opava Hana ŽÁKOVÁ. Kun helpo de vico da eksterlandaj esperantistoj kaj diversaj institucioj ŝi gajnis multajn dokumentojn, kiuj metas novan kaj faktan rigardon al tiu ĉi interesa demando. Montriĝis, ke pri ĝi vastiĝis malveroj kaj eraroj. La aŭtorino pruvis, ke ekzistis aŭ ankoraŭ ekzistas komunumoj nomitaj LIDICE en Usono, Meksikio, Brazilo kaj Panamio. Tute erare oni samon ofte asertis pri Izraelio, Aŭstralio, Kubo kaj Sud-afrika Respubliko.

Krom detala priskribo de opaj komunumoj, ties historio kaj la nuntempa vivo, ŝi taksas ankaŭ sintenon de loka loĝantaro al Ĉeĥoslovakio. Unu el tiuj komunumoj - nome Nova Lidice en Brazilo - estas tute nova malkovro de persista laboro de Hana ŽÁKOVÁ.

Eltiraĵon el la menciita laboro, kiu estis jam tre alte taksita en la tutŝtata konkurso de studenta faka aktiveco, publikigos la ĉeĥoslovaka numero de la gazeto PACO.

-VKĉ-



# el junularo vivo

## KONFERENCO DE LA SLOVAKA ESPERANTO - JUNULARO

En la tagoj de la 22-a ĝis la 24-a aprilo 1983 okazis en SVIT apud Poprad la 4-a Konferenco de Junaj Esperantistoj en Slovakio /JES/, kiun partoprenis ĉirkaŭ 30 delegitoj kaj 3 gastoj: reprezentantino de la hungara E-junularo Edit KLEIN, reprezentanto de la ĉeĥa E-junularo Miroslav MALOVEC kaj reprezentanto CK SEA d-ro LUKÁČ.

La labora programo de la konferenco realiĝis dum la sabata antaŭtagmezo. La ĝisnuna prezidanto de JES Stano MARČEK rememorigis sukcesajn aranĝojn de la pasinta periodo kaj anoncis, ke pro agaj kaj familiaj kaŭzoj li ne plu povas labori en JES. La konferenco dankis al li por la ĝisnuna sindona laboro. Poste estis elektita nova komitato kaj aprobita nova laborplano. En diskuto nia reprezentanto koncize informis pri la laboro de la ĉeĥa E-junularo. Post fina parolo de d-ro LUKÁČ estis la labora parto de la konferenco fermita.

Posttagmeze kunsidis la nova komitato kaj disdividis la funkciojn. La prezidanto de JES fariĝis 23-jara studento Milan IVAN, vicprezidantoj Milan ONDRUŠ kaj Rudolf GREGA, sekretariino Iveta MOZOLÁNYOVÁ. Pluaj membroj de la komitato estas FLAŠKOVÁ, GAJDOŠÍKOVÁ, MIŠÍK, MOLÍK, ŠIVECOVÁ, VINTEROVÁ kaj ZVARA, en la kontrola kaj revizia komisiono laboros KOCIÁNOVÁ, ÖLLÖSOVÁ, SALÁT.

JES organizos en aŭgusto en KOŠICE Junularan Esperanto-Lernejon, kiu unuafoje okazis en 1982 en BARDEJOV. Tiam ĝin partoprenis pli ol 50 s-anoj el Slovakio, Jugoslavio, Rumanio

kaj Hungario kaj oni instruis en kursoj por komencantoj /A/, en konversacia kurso por progresintoj /B/ kaj en seminario.


En 1982 ankaŭ komenciĝis en TATRANSKÁ ŠTRBA dujara lernejo por junularaj aktivuloj; ĉiujare okazos kvar renkontiĝoj kun prelegoj pri historio, literaturo kaj organizo de Esperanto. En 1984 plie efektiviĝos seminario por junularaj aktivuloj el socialismaj landoj.

Por oktobro 1983 estas denove planata ASCENDO SUR KRÁLOVÁ MONTO. Pasintjare partoprenis ĝin ĉirkaŭ kvindek gejunuloj. Sur la pinto ĉiuj ricevis insignojn kaj vespere ili komune amuziĝis en amuzprogramo.

En decembro por la KULTURAJ TAGOJ DE POPRAD estas invitataj ĉiuj interesuloj pri konkuro en deklamado de poezio, en muzikado, en prezento de propraj fotografaĵoj kaj diapozitivoj.

La slovaka Esperanto - junularo esperas pri pli intensaj kontaktoj kaj kunlaboro kun la ĉeĥaj kaj hungaraj junularoj.

-MMc-



## ni recenzas

GRAMATIKA DEMANDARO RESUMA. Kompilis Julio Baghy. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio Budapeŝto 1982 kiel kvaran eldonon. Kajero 40-paĝa, formato 14x20 cm, prezo 15,-- Kčs.

Jen utilega resuma verko pri la Esperanta gramatiko kompilita surbaze de PLENA GRAMATIKO de K. Kalocsay - G. Waringhien kaj de ESPERANTA SINTAKSO de P. Fruictier far Julio Baghy, nia elstara poeto kaj lingva korifeo. La simpatia verko redonas en esenco kaj koncizo tion, kio en la preskaŭ 500-paĝa Plena Gramatiko eble iujn fortimigas. Nepre devus ĝin posedi kaj konsulti ĉiu, kiu okupiĝas serioze pri Esperanto. Ĝi estas uzebla por diverslingvanoj kaj kompletigebla per koncerna nacilingva traduko de la aldonita listo de gramatikaj fakvortoj. Lingve altnivela verko. Sola trovita korektindaĵo: sur paĝo 30 supre en la 2-a tabelo en kolumno FORMO oni misinterŝanĝis vortojn substantivo - adjektivo. Tiu ĉi kajero devus troviĝi sur ĉiu Esperanta vendo-stando.

J. Kořínek

LA SKANDALO PRO JOZEFO. Originalo de Valdemar Vinař. Eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Prago, 1981. Ĝi aperis en PANORAMO, aparta literatura almanako de STARTO, redaktata de V.Kočvara, 68 paĝoj, kartonita, prezo 13,-- Kčs.

Sprita, humura, ekscite altira kaj tamen pensiga verko, kies temo plurfoje allogis famajn verkistojn /ekz.T. Mann/ al prilaboro, kun tikla temo, altira satiro, profunde psikologia, apokrife prilaborita en eminenta rakont-maniero de V. Vinař, talenta verkisto kaj sukcesa reĝisoro, bedaŭrindege jam forpasinta, verkita en perfekta, senmanka lingvo, altnivela stilo, plene absorbos kaj amuzos ĉiun leganton. Neniu



KOVOVÉ
METALAJ REMIZOJ
GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbotavolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila muntado aŭ sur submuro aŭ sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 semajnoj liveras

INKLEMO
PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.

# KDS

## Sedlčany

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj
tipoj
tondiloj por la kureja prilaboro
de kortbirdoj
higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la
malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR
Eksportas MERKURIA Praha


## ZLATNÍK

DUV ZLATNÍK OSTRAVA ZHOTOVUJE ZLATÉ ŠPERKY Z MATERIÁLŮ DODANÉHO ZÁKAZNÍKEM. PŘIJĎTE SI VYBRAT Z BOHATÉ KOLEKCE VZORŮ NA NAŠE PRODEJNY UMÍSTĚNÉ V OKRESECH OSTRAVA, OPAVA, FRÝDEK-MÍSTEK, KARVINÁ, NOVÝ JIČÍN, BRUNTÁL A PŘEROV.

PRO POTŘEBY ŠIROKÉ VEŘEJNOSTI VYRÁBÍME ELEKTRICKÁ SAUNOVÁ KAMNA O PŘÍKONU 6 A 9 kW, KUKAČKOVÉ HODINY, VYSOUŠEČE VLASŮ, SKLÁDACÍ TURISTICKÉ LOPATKY, ČESÁČKY OVOCE A PÍŠŤALKY PRO VÝCVIK PSŮ.

VÝROBKY ZASÍLÁME POŠTOU NA DOBÍRKU.

*DRUŽSTVO UMĚLECKÉ VÝROBY*
*729 12 OSTRAVA 1, Smetanovo nám. 7*




Produkta kooperativo ZNAK Hradec Králové aĉetas jenajn plumarspecojn:

plumaron de ora fazano
plumaron de perdriko
plumaron de numido
kokajn kurtenetojn surkolajn

Prezo de plumaro estos fiksita post la unira kontrolo en la produkta kooperativo ZNAK Hradec Králové. La aĉetsumon ni sendas perpoŝte. Plumaron sendu lau la adreso

ZNAK výrobní družstvo,
Pražská 686/501 01 Hradec Králové

SCIENCO·ESPLORO·TEKNIKO

# TUTŜTATA AGRIKULTURA EKSPOZICIO

# TERO PANDONANTINO

27.8.–11.9.1983

ČESKÉ BUDĚJOVICE

preterlasu la okazon havigi al si ĉi tiun ege interesan libron.

-jvk-

KION SCII POR ORGANIZI NIAN MOVADON. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio Budapeŝto 1982. Kajero 30-paĝa, formato 14x20 cm, prezo 16,-- Kĉs. Kun la antaŭparolo de la respondeca redaktoro Imre Szabó.

La kajero prezentas studaĵon de d-ro Detlev Blanke pri la INTERNA IDEO de Esperanto. La verketo eksplikas la starpunkton de marksismo-leninismo al la idealisma teorio pri la t.n. INTERNA IDEO de Esperanto. Koncedante, ke en la komencaj jardekoj de Esperanto ĝi estis grava pilastro kaj motoro de la juna lingvo, fonto de entuziasmo kaj sinoferemo por multaj adeptoj, ĝi dedukas, ke ĝi por la sobra ekzaktema scienc-teknika nuno estas eksmoda. Adepti al ideoj de justeco, neekspluatado, egaleco, maldiskriminado, malrasismo - t.e. al la plej edifaj idealoj de humanismo: jes, sed kredi, ke la lingva diverseco estas la ĉefa kaŭzo de interhomaj, interpopolaj konfliktoj ne plu eblas. Ja militoj inter samlingvanoj estis ofte la plej kruelaj / usona milito 1861 - 65, hispana 1936, militoj korea kaj vjetnama, salvadora k.a./. Motivoj politikaj, klassociaj, kapitalismaj, sindefenda klasbatalo, estas la kaŭzoj de militoj kaj el ili fontas ankaŭ la nuntempa danĝero por nia planedo. Sed al ili viciĝas ankaŭ potencavido kaj sinadoro de iuj estroj ŝajne samreĝimaj.

Tio dubindigas la kredon, ke samreĝimeco samkiel samlingveco ekskludus konfliktojn kaj militojn, se ne intervenus homa saĝo, bona volo kaj pacamo. Pravas la aŭtoro: ankaŭ nia Esperanto-movado spegulas la ceteran homan socion kun ĉiuj ĝiaj virtoj kaj malvirtoj - eble kun iom pli da pacema saĝo. Ĉu do deprimu nin, ke NIA AFERO ne tiel progresas kiel ni supozis, ke eble longe, longe forestos la venko de tiel saĝa ideo, ke iu nacia lingvo spite niajn konkludojn kaj supozojn ekludas rolon de IL, helpata ĉe tio miope eĉ de siaj rivaloj? Kalmán Kalocsay foje diris, ke li ne estus kapablinta sin tiom fordoni al Esperanto, se ĝi ne fariĝintus lia granda hobio, amitaĵo. Nur tiam oni povas sin tiel plene fordoni al bona afero ne profitdona kaj eventuale eĉ senŝanca!

Jen utilega kajero diskutinda en niaj kluboj. Lingve ĝi estas altnivela.

J. Kořínek

## KRONIKO

La 9-an de julio 1983 en ROUCHOVANY geedziĝis f-ino Zdenka KRÁLOVÁ kaj s-ro Miloš ŠŤASTNÝ. Sinceran bondeziron!

La 7-an de majo 1983 geedziĝis en ÚSTÍ NAD LABEM f-ino Dana NOVOBILSKÁ kaj s-ro Luboš MARŠÁLEK. Sinceran gratulon kaj bondeziron!

La 20-an de julio 1983 ĝisvivis s-ano Stanislav LEŠINGER el PRAGO 80 jarojn. Li estas esperantisto de la jaro 1922, de 1930 li estas membro de E-klubo en Prago. Longajn jarojn li laboris en SEL. Sinceran bondeziron!

### NI KONDOLENCAS

La 28-an de majo 1983 subite mortis en SLANÝ JUDr. Václav FAIGL /72 j./. Honoron al lia memoro!

La 5-an de julio 1983 forpasis subite longjara esperantisto s-ro Alexius BERKA el VSETÍN ne ĝisvivinte sian 74-an naskiĝtagon. Honoron al lia memoro!

## KORESPONDI DEZIRAS ANONCOJ

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kĉs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Estona lernantino /15-jara/ dez.kor.kun knabo - SU 200026 TALLIN, Keskuse 22-25, Katrin KALJURAND.

Danutė DAČIULYTĖ /15-jara/ USSR-Litovio, 234880 KUPIŠKIS, Lauko 11 dez.kor.tutmonde pri ĉiuj temoj kaj samaĝuloj.

Kor. pri muziko, turismo, kulinario kaj pri ĉiuj junularaj problemoj kaj inters.PM kaj BK kun gejunuloj el la tuta mondo dez. Inese KOLINA /20-jara f-ino/, "PLĒSUMI", SU-228540 VECPIEBALGA, Cēsu Raj., Latva SSR, USSR.

Willy EHLERS, Hallandstr.24, 1100 BERLIN, GDR, serĉas helpantoj por prepari ekspozicion okaze de la 40-a datreveno de fino de la 2-a mondmilito. Sendu fotojn aŭ priskribon de memorŝtonoj aŭ tomboj de germanaj kontraŭfaŝistoj, mortigitaj dum la 2-a mondmilito.

Junulo 18-jara serĉas leteramikon /inon/ kun intereso pro vojaĝo kaj kampado - nur el socialismaj landoj - Rainer BIRKHOLZ, 2600 GÜSTROW, Leninring 1, GDR.

De la 9-a ĝis la 11-a de marto 1984 la Lejpcigaj Esperantistoj en Kulturligo de GDR denove organizos INTERNACIAN FOIRAN ESPERANTISTAN RENKONTIĜON - I F E R ´ 8 4 kun la ĉeftemo PROGRESO EN NIA TEMPO. Lejpcigo invitas vin.

Letervespero okaze de 60-jara fondiĝo de Esperanto-klubo en PŘEROV okazos la 15-an de oktobro 1983. Al ĉiuj ni respondos. Adreso: Esperanto-klubo ZKPS, Žerotínovo nám.33, 750 00 PŘEROV, ČSSR.

Interesiĝantoj pri la revuoj MONATO, LITERATURA FOIRO, PLANLINGVISTIKO, FONTO kaj ESPERANTISTA VEGETARANO, skribu al: Stano MARČEK, Zvolenská 15, 036 01 MARTIN, ČSSR.

## )Lingva angulo(

ANKORAŬ PRI TRANSITIVECO DE VERBOJ

En la GDR-numero de PACO el 1982 aperis sur p. 23 artikolo de Bernard Golden sub titolo PLUAJ RIMARKOJ PRI LA TRANSITIVECO DE VERBOJ. La aŭtoro prave konstatas, ke transitiveco, resp. ties ne plena kono estas stumbligilo por multaj lingvouzantoj,

kaj pekoj kontraŭ tiu gramatikaĵo konstateblas en publikaĵoj de prestiĝaj aŭtoroj inkluzive akademianojn. B. Golden opinias, ke la aferon faciligus, se ni ĉesus insisti pri transitiveco de verboj kaj sekvante iujn etnajn lingvojn rezignus pri tiu precizigilo de la lingvo, kiu ĝin samtempe ankaŭ malfaciligas. Nu, ankaŭ pri aliaj nefacilaĵoj en Esperanto oni dum jardekoj multe cerbumis kaj diskutis. Mi memoras,ke antaŭ jardekoj Teo Jung en Heroldo rekomendadis forlasi la devigan akuzativon. La objekton devus montri la pozicio en la fraza vortordo /vidu la anglan kaj Idon/. En la kvindekaj jaroj Francisko Azorin eldonis REFORMITAN Grandan vortaron de Esperanto, frizitan laŭ lia gusto kaj kvazaŭ laŭ ABSOLUTA LOGIKO. Antaŭ ĝia uzado kaj disvastigado devis averti la Akademio.Mi ne opinias, ke multe helpus nin malzorgi la transitivecon de verboj kaj kontentiĝi per klarigivo de la kuntekstoj. Tio kondukus al certa ĥaoso kaj konfuzigo de komencantoj kaj lingvouzantoj. Malgraŭ, ke ni ripetfoje renkontas tiajn SITUITA, SUBEVOLUITA, REZULTAS GRANDAN LABORON, MI INTERESAS PRI TIO, ĜOJAS MIN, ESTU BONVENATAJ kaj similaĵojn, mi opinias, ke ni ne faru novajn ŝanĝojn, kaj tiel esencajn, sur kampo de transitiveco. Sufiĉe jam malhelpas la diferencoj inter PV kaj PIV. Mi notu nur kelkajn elinter pluraj: Kontribui en PV tr/ntr, en PIV ntr; aperti tr PV, aperta PIV /sekve aperti ntr/; korekti tr PV,PIV,korekta laŭ PV = ĝusta, laŭ PIV en tiu senco evitinda k.a.Pro la uzo de KOREKTA laŭ PV ekestis eĉ akra disputo inter du ĉeĥaj esp. aŭtoroj. Ĉu ĉiu havas la eblon kaj monrimedojn aĉeti por 860,-- Kčs PIV? Ĉu tiuj, kiuj laboras laŭ PV estu kondamnindaj kiel fuŝuloj? Ni devas koncedi, ke bone regi Esperanton postulas konsiderindan laboron, ĝin anstataŭigi ne povas ia prestiĝa titolo. Bona uzantino de Esperanto, praga aktorino Eva Seemannová foje deklaris, ke Esperanto ne estas facilega lingvo, pli vere male! Ĉiu lingvo, pretendanta esti perfekta kaj preciza esprimilo de homaj pensoj ĝis subtilaĵoj, ne ŝtopeblas en 16 gramatikajn regulojn. La moderna lingvo de la estonta socio ne estos tiel ekstreme simpla kaj facilega. Sen esceptoj Esperanto finfine ankaŭ ne estas spite siajn logikecon kaj regulecon. Pri FUMI ne estu tro da embaraso. Ja pluraj vortoj havas kelkajn malsamajn signifojn. PIV ĉe FUMO/FUMI diras 1/ntr, ellasi fumon /fajro, fumtubo, fumas/, 4/ tr enspiri fumon de bruligitaj tabakaĵoj aŭ aliaj drogoj /fumi cigaredojn, pipon, opion ks/. Do ĉi tie ne temas pri SOLA escepto. Sed esceptoj - neregulaĵoj estas ekz. la dusenca uzado de NE DEVI /mi ne devas labori - ne havas devon labori, aŭ mi havas devon ne labori/. Aŭ uzado de prepozicio TRANS kun lokŝanĝo foje kun laŭregula direktomontra akuzativo, jen foje sen ĝi: La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj /Z/, kaj sen akuzativo: pensoj iras trans la limo sen pago kaj timo /Z/. Ĉi tie eble pro la rimo estis forlasita la lokŝanĝa -n, PIV. Hanibalo iris trans la Alpoj. /B/,PV.Kaj oni trovus kelkajn pluajn. Sed kompense Esperanto ne estante ABSOLUTE logika kaj regula, estas lingvo vivanta, uzata taŭge de dekmiloj.

Kaj, ke oni devas iam-tiam konsulti vortaron, dume la plej fidindan PIV, oni ne grumblu. Ni imagu, kiom da dekmiloj da lernohoroj oni oferas al la ellerno de sia gepatra lingvo. se



oni kalkulus la lernohorojn en la bazaj lernejoj, en la mezlernejoj, en la altlernejoj, la daŭran vid-aŭdan spertadon de la lingvo ekde infanaĝo en la familio, en la ceteraj lernobjektoj en lernejoj, ĉe la praktikado de la lingvo en ĉiutaga vivo dum jaroj ĉie ĉirkaŭ ni. Se ni tian tempon dediĉus al Esperanto, al kiom da lernohoroj kaj lingvopraktikado tio egalus?Kaj post tiom da ĉiuspeca lingva praktikado eĉ altlernejanoj iam eraras en sia gepatra lingvo!

Ĉeĥa verkisto, kiu dum lastaj 3 - 4 jaroj ekuzas ankaŭ Esperanton, diris al mi, ke necesus, ke en verbo estu ia distingilo por tuj ekkoni, ĉu ĝi estas transitiva. Ekz.: la ĉeĥa ZAČÍT, KONČIT /komenci, fini/ povas funkcii jen transitive,jen netransitive, kaj en la vortaroj kaj lernolibroj iam mankas pri tio atentigo. Miaopinie en vortaroj kaj lernolibroj oni aldonu memoreblan distingilon al ĉiu transitiva verbo.Anstataŭ nun uzataj tr, ntr, oni NUR al la transitivaj verboj postmetu "t". Ĉiu tuj lernus ekz.: fari-t, vidi-t, preni-t, kovri-t,fumi-t, apud la netransitivaj situi, rezulti, evolui, fumi, ktp. Tiu signo "t" anstataŭ "tr" , samtempe ĝi elvokus imagon de pasiva participo -it, ebla nur ĉe transitiva verbo: farita,vidita, prenita, kovrita, fumita ks. Kompreneble ĉiu ekkonus, ke tiu "t" estas nura memorhelpilo, sufiĉe efika, kiu ĉe la uzado de la verbo forfalas.

J. Kořínek

DUDEKO DA FAKAJ VORTOJ POR PRAKTIKA UZO /10/

akseo - osa /součást stroje/
arierulo - obránce /v kopané/
avanulo - útočník /v kopané/
detergento - detergent /výrobek s výraznou čisticí a prací schopností obsahující tenzid,mýdla,saponáty/
disgambo - roznožení /poloha napjatých nohou/
fibolo - zavírací špendlík
insilujo - silážní stavba /jáma, komora, silo/
jokero - žulík /v kartách/
konstrukto - konstrukce /struktura vytvořená člověkem, díl stavby/
kovra povo - kryvost /o barvě/
kurumo - rozběh /vyřazovací etapa běžeckých závodů/
leno - dopravní pruh /podélná část vozovky ohraničená čarami/
lokotenento - místodržící
perpetri /tr/ - spáchat, dopustit se
piktogramo - piktogram /kresebné znázornění informace, např. na nádraží, letišti ap./
ruldomo - maringotka
rumpo - hovězí zadní maso, horní část kýty /pozn.: rumsteko v PIVu by mělo být upraveno na RUMPSTEKO - řízek z kýty/
rundo - kolo /v sportovních soutěžích/
flanka kaj fronta spagato - bočný a čelný rozštěp /cvik zvaný hovorově šňůra/
ŝotro - štěrk /jen drcený/

/we/

# RONDETA VIVO

B R N O :
EK arangis la 19.4.1983 sub artisma gvido de prof. Helena SUPOVÁ-HALÍŘOVÁ solenan koncerton omaĝe al la Jaro de la ĉeĥa teatro. Riĉan programon prezentis aro da gekantistoj, premiitaj dum la lastaj konkursoj. Kelkajn violon-komponaĵojn prezentis majstro de Brna Filharmonio s-ro FILIPOVSKÝ. Plena salono, arda etoso, grandega entuziasmo de la kontentega publiko. -vr-

B U Č O V I C E :
La 11.4.1983 estis inaŭgurita en kunlaboro de EK BRNO ekspozicio de infandesegnaĵoj INFANA DESEGNAĴO EN BATALO POR PACO. La ekspozicion kompletigis diversaj E-materialoj. La ekspozicio okazis en halo de Unuiĝinta Uzin-Klubo. Preparis MUDr. Vladimír ŠKODA. -vr-

H A V Í Ř O V :
En marto estis aranĝita kultura programo omaĝe al la Internacia Virina Tago. Okazis ankaŭ solena jarkunveno de ĉiuj interesrondetoj de Kulturdomo P. Bezruč. Niaj membroj uzis tiun ĉi eblon kaj prezentis al la ĉeestantoj E-librojn,korespondaĵojn kaj kronikon.Ing.NOVOTNÝ informis prelege pri celoj kaj signifo de nia movado. La intereso pri tiu ĉi aranĝo estis granda. Antaŭ la gloraj majaj tagoj prelegis Jarmila PASTRŇÁKOVÁ kaj prezentis diapozitivojn pri sia vojaĝo MOSKVON kaj SAMARKANDON, kie ŝi ĉeestis esperantistan edziĝfeston. La 26.5.1983 parolis pri humuro en la E-literaturo Ing. Zd. NOVOTNÝ kaj estis legataj fragmentoj el diversaj verkoj. -ASt-

K A R L O V Y V A R Y :
Plene en signo de la Monda Asembleo por Paco kaj Vivo,kontraŭ la Nuklea Milito, samtempe kunveninta en la ĉefurbo de ĈSSR PRAGO, okazis inter la 23-a kaj 28-a de junio 1983 la sesa internacia turisma renkontiĝo de esperantistoj en ERCMONTARO. La aranĝintoj elektis por kulminaĵo de sia nunjara agadplano teritorion ĉirkaŭ eksmineja urbeto NOVÉ HAMRY.La pacrenkontiĝon, reliefiĝanta tradicion de la komunaj aranĝoj de la ĉeĥaj kaj germanaj laboristaj esperantistoj el la tridekaj jaroj kontraŭ faŝismo kaj milito, partoprenis 55 gesamideanoj el BULGARIO,KANADO, HUNGARIO, GDR kaj ĈSSR.Komence de la renkontiĝo estis sendita rezolucio al la Monda Porpaca Asembleo en PRAGO. La partoprenantoj esprimis en ĝi obstinon eluzi ĉiujn eblecojn de la ĝenerala kono de la internacia planlingvo Esperanto tute por profitode nuntempa tutmonda pacmovado.En ceIlokoj de la unuopaj turistmarŝoj la partoprenantoj konatiĝis kun centroj de la kontraŭfeŭda kaj pliposte laborista movado: POTŮČKY, HORNÍ BLATNÁ, PERNINK, ABERTAMY, NEJDEK kaj MERKLÍN. La antaŭlasta tago de la renkontiĝo estis dediĉita al vizito de la mondfama banejurbo KARLOVY VARY. -jkt-

O L O M O U C :
En nia urbo en la lasta lernojaro formiĝis junulara grupo, kiu tre vigle eklaboris por Esperanto. Ĉar pliparto estas studentoj kaj post studado ili devis forlasi la urbon,ilia agado koncentriĝis precipe al propagando de Esperanto inter neesperantista junularo.La junulara grupo i.a.aranĝis diskotekon kun E-programo en altlerneja klubo. Alia aranĝo estis interbabilado kun la poeto Jiří KAREN, denove inter altlernejanoj, post kiu kelkaj partoprenantoj esprimis sian intencon lerni Esperanton. El ĉeteraj aranĝoj ni nomu amasan ĉeeston je Renkontiĝo de pacdefendantoj, komunajn restadojn en ĉirkaŭaj montaroj,laborbrigadon en SET k.a.

Š U M P E R K :
Dimanĉe la 5.6.1983 kunvenis pli ol 20 gesamideanoj el ĉirkaŭaj kluboj /KRNOV, OLOMOUC, OPAVA kaj ŠUMPERK/ ĉe motoresto SKŘÍTEK. Vojo, kiu kondukis al ZTRACENÉ KAMENY kaj JELENÍ STUDÁNKA, post 15 km finiĝis en VERNÝŘOVICE, kie estis ĉiuj partoprenantoj gastigitaj per teo kaj keksoj. Ankaŭ varma k. suna vetero kontribuis al agrabla amikeca atmosfero, kiel montras la foto. -dv-



Ú S T Í N A D L A B E M :
La 21-an de aprilo 1983 okazis la solena jarkunveno de la Sindikata Domo de Kulturo de Laboruloj /ODKP/ en Ústí nad Labem. Por la E-rondeto de ODKP prezentis elĉerpan kaj profunde konvinkan raporton la prezidanto de la rondeto doc. RNDr Vlastimil NOVOBILSKÝ, CSc. Ĉe tiu okazo estis s-ano doc. Vl. NOVOBILSKÝ distingita per honordiplomo por sia elstara laboro sur la kampo de la internacia lingvo kaj amikeco. Okaze de la Tago de Poezio en Ústí nad Labem partoprenita de pluraj elstaraj ĉeĥaj gepoetoj en la operteatro la 4.4.1983, dum la sekvinta autografado s-ano Jiří KOŘÍNEK prezentis al la poeto nacia artisto Ivan SKÁLA, prezidanto de Asocio de Ĉeĥaj Verkistoj, siajn tradukojn el la prezentitaj poemoj /Rekviemo por ordinara homo,Maja Soneto, Ili venas tien ĉi / por subskribo. La poeto post subskribo petis alsendon de la tradukoj. Por la senditaj E-tradukoj li dankis per oficiala letero de la prezidanto de Asocio de Ĉeĥaj Verkistoj de la 19-a de aprilo 1983 per jenaj vortoj: Estimata kamarado Jiří Kořínek, Ústí n.L. Estimata amiko, mi volas al vi danki por la tradukoj, kiujn vi al mi sendis kaj por la letero, el kiu mi eksciis multon interesan. Estas aparta sento, kiam oni legas siajn laboraĵojn en malproksima lingvo, kiun oni ne konas kaj el kiu oni perceptas antaŭ ĉio la sonan flankon. El tiuj koncizaj informoj mi vidas, ke per via kreado vi faras tre meritplenan laboron por konatigo de nia kulturo kaj vivo de nia lando. En tio mi volus al vi deziri multe, multe da pluaj sukcesoj kaj mi salutas vin kore. Ivan SKÁLA, p.m. -jk-

Z N O J M O :
Tri klubanoj de EK Znojmo parolis pri E-renkontiĝo de Pac-

defendantoj en Pardubice. S-ano POLÁK el PROSIMĚRICE havis paroladon pri sia vojaĝo PER AŬTO TRA SOVET-UNIO. Krome estis aranĝita plua bildkart - ekspozicio.

-VR-

## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

**SJEZD SLOVENSKÝCH ESPERANTISTŮ** ●

Už po deváté byl zahájen dne 16. července 1983 v ŽILINĚ. Dá se říci, že šlo o historický předěl v životě SLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU. Ano, nepíšeme název této organizace nesprávně. Rozhodnutím delegátů se mění název organizace /původní název byl Svaz esperantistů ve Slovenské socialistické republice/, ale do značné míry i vlastní stanovy svazu. Jednání za náš svaz pozdravil tajemník Zdenko KŘIMSKÝ. Přítomni byli i hosté z politických a správních orgánů a esperantských svazů z Bulharska, Maďarska, NDR a Polska.

Ve zprávě zástupce ministerstva kultury Dr. M. DROBNÉHO byla vysoce hodnocena práce slovenského svazu. Sjezd provázela i bohatá kulturní náplň, od výstavy o esperantském tisku přes vystoupení národopisných souborů písní a tanců, až po výborný komorní koncert učitelů konzervatoře.

Odpoledne 17.7.1983 si delegáti zvolili nové předsednictvo v čele s předsedou Dr. Andrejem LUKÁČEM, CSc a místopředsedou Ing. Milanem ZVAROU.

**HISTORIE ESPERANTSKÉHO HNUTÍ V ČSSR** ●

Kniha výše uvedeného názvu vyšla v nákladu 3000 ks v našem svazu. Jde o ojedinělou publikaci připravenou dle záznamů a vzpomínek nestora esperantského hnutí u nás s-ana KAMARÝTA. Je možno si ji objednat v našem sekretariátu - cena Kčs 42,-- bez poštovného. Kdo se chce dozvědět zajímavé skutečnosti o esperantském hnutí v ČSSR, ten nemůže váhat.

**NEZAPOMEŇTE NA ESPERANTSKÉ UČEBNICE** ●

Nastává období výuky esperanta ve vašich kroužcích. Objednejte si včas dostatečný počet učebnic, zejména pak pro děti od 3. tříd. Zároveň připravujeme do tisku již druhý díl učebnice Esperanta pro děti, který vyjde v prvním čtvrtletí 1984.

**ČLENSKÉ PŘÍSPĚVKY** ●

Blíží se také období, kdy budeme vybírat členské příspěvky. Prověřte při této příležitosti i limity příjmů, podle nichž se příspěvky vybírají. Jde o podstatnou podporu našeho hnutí. Jako loni, bude platit i letos, že ta MS, která odešle ode všech svých členů členské příspěvky do 31.12.1983 a neklesne-li u ní počet členů pod stav k 31.12.1982, má nárok ponechat si 15% z celkové částky vybraných příspěvků. U těch MS, kde dojde k poklesu členské základny, ponechají si 10% z částky odeslané k 31.12.1983. Z dalších členských příspěvků odeslaných po 1. lednu 1984, nemá MS nárok, aby si ponechala jakoukoliv částku. Pomozte proto všichni včasným zaplacením členských příspěvků ke zlepšené finanční stabilitě vaší MS.



**KOMPUTILA VORTARO - NOVA TERMINARO KIU APERAS** ●

Vortaro Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta kontinuigas vortaron hungaran, kvinlingvan, komputilteĥnikan. Aŭtoro F. CABÁK, eldonkvanto 500 pecoj, formato A5, 30 paĝoj de komputilaj esprimoj, prezo 16,-- Kčs, mendebla en sekretariejo.

**SCHŮZKY LITERÁRNÍ SEKCE ČES** ●

Konají se pravidelně každou t ř e t í sobotu v měsíci s výjimkou července a srpna, tedy 10x do roka v klubovně mládeže ve Vejvodově ulici v Praze 1 od 14,00 hod. Semináře se konají v sobotu odpoledne proto, aby se zasedání mohli zúčastnit i členové bydlící mimo Prahu a aby k prodiskutování témat bylo dostatek času, neboť kromě uvedené tématiky, budou podávány informace o dalších záležitostech týkajících se literatury, tvorby apod.

**STARTO 1984** - limdatoj por akcepti viajn kontribuaĵojn:

| | | | |
|---|---|---|---|
| n-ro 1/84 .......... | 16.01 | n-ro 4/84 .......... | 16.07 |
| n-ro 2/84 .......... | 15.03 | n-ro 5/84 .......... | 14.09 |
| n-ro 3/84 .......... | 15.05 | n-ro 6/84 .......... | 06.11 |

Ni anoncas al ĉiuj, kiuj volas sendi la kontribuaĵon por la 6-a numero de STARTO 1983, ke la limdato estas: 31.10.1983.

**GEESPERANTISTOJ EL FINNLANDO KAJ SVEDIO**

vizitis Pragon tuj post la 68a UK en Budapesto. Laŭ ilia lebera tempo kaj laŭ intereso klopodis nia asocio organizi por ili viziton de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Bedaŭrinde, ke partoprenis tiun aranĝon nur kelkaj el niaj esperantistoj. Tamen ŝajnas, ke al ili plaĉis kion povis vidi kaj travivi. Sur la foto estas parto de finlandaj geesperantistoj vizite en asocia sekretariejo.





# SKITAGOJ EN KRKONOŠE

Post sukcesa nunjara SKITAGOJ ni ankaŭ venontjare aranĝos la saman. Temas pri semajno, kiun vi povas travivi en junulara medio en montara domo/bonega regiono por skiado, montara suno kaj pura aero, komforta restado, dancado tabla teniso, komuna amuzo dum vesperoj/. Ni invitas esperantistojn - skiantojn kaj iliajn geamikojn el tuta Europo.

Kaj nun kelke da datoj :

Kiam estos la SKITAGOJ : - 16.01.1984 - 22.01.1984

Kie ĝi okazos : proksime de konata sportcentro/en montaro Krkonoše / Špindlerův mlýn - norda parto de Bohemio.

Prezo por semajno : nur por loĝado estas 210,--Kčs aŭ 69 Gld / prezo ne inkluzivas manĝon ĉar-vidu sube .....

Ni kalkulas, ke vi aŭ kunprenos kune ian bazan nutraĵon aŭ ĝin vi surloke aĉetos. Ni kuiros mem en granda kuirejo.

Ni atentigas vin, ke la arango estas taŭga ĉefe por skiantoj .

Plurajn informojn vi ricevos al adreso :

JUNULARA SEKCIO DE ĈEHA ESPERANTO ASOCIO, JILSKÁ 10, 110 01 PRAHA 1.

STARTO - informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10, 110 01 PRAHA 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6 foje jare. Responda redaktoro Zdenko Křimský. Grafika aranĝo Milan Labašta. Desegnaĵoj Pavel Rak. Jarabono Kčs 24,--, por eksterlando Kčs 36,-- aŭ 10,50 gld, inkluzive sendkostojn. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA aŭ rektvoje al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská ul.10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko Křimský. Grafická úprava Milan Labašta. Kresby Pavel Rak.

Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č. jedn. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.



ESA M 80

ESTAS PRAKTIKA HELPANTO POR HEJMO.ĜI OFERTAS VICON DA AVANTAĜOJ
- SIMPLAN PRISERVON
- MAPRIGRANDAN MANIPULADON
- MAL LONGAN TEMPON POR GLADI
- MALALTAN KONSUMON DE ELEKTROENERGIO
- ESTETIKAN FORMON KAJ ALIAJN

TEKNIKAJN DATOJN:

| | |
|---|---|
| ELEKTROKURENTO | 220 V /50 HZ |
| BEZONO DE ENERGIO | 2060 W |
| 2 TERMOSTATOJ | 20-250° C |
| LONGECO | 960 mm |
| LARĜECO | 290 mm |
| ALTECO | 350 mm |
| PEZECO | 28 kg |
| PREZO | 4.340 Kčs. |

PRODUKTAS
**Elektrodružstvo**
**PRAHA 8, KUNDRATKA 17**




VD TVAR Pardubice je monopolním výrobcem sportovních ochranných přileb značka CASSIDA. Tyto přilby obdržíte v prodejnách Domácích potřeb, Drobného zboží a Mototechny.

Zájemcům zašleme požadovaný typ přilby prostřednictvím našich služeb

TVAR VD
Jägermanova 1682
530 03 PARDUBICE